



### **KVIN JAROJ DE LA JAZIDA GENOCIDO**

Dum tiuj ĉi tagoj(\*) okazis la datreveno de la komenco de la jazida genocido. Ĝi okazis en 2014. Komence de aŭgusto la ĝihadistoj de la tiel nomata Islama Ŝtato kaptis la Ŝengal-montaron<sup>(1)</sup>, murdis la virojn kaj rabis la inojn kaj infanojn, por ilin sklavigi. Ili aranĝis aŭkciojn de jazidaj knabinoj en la foiroj de Mosulo<sup>(2)</sup> kaj Sirio. La Islama Ŝtato forfalas, ties tutan teritorion perdis, sed malaperigitaj restas ankoraŭ 3000 jazidoj, kiel la jazida pacnobelpremiito Nadiye Murad memorigis al Donald Trump antaŭ du semajnoj en la Blanka Domo.

Tiu okazaĵo skuis la konsciencon de la tuta mondo, kaj tuj alvenis la sieĝo de Kobano, kaj la defendo de la kurdaj partizanoj alportis la revolucian fascinon. Ankaŭ inter ni<sup>(3)</sup>, post jaroj dum kiuj manpleno da personoj pritraktis kurdiajn aferojn, okazis eta sed grava ondo de solidareco – paradoksas, ke flanke de la admirantoj de la kuraĝaj knabinoj de mezoriento, anstataŭ aŭskulti la maldekstrajn, kontraŭklerikajn kaj feminismajn muzulmanojn, oni ĉiam pli atentis pri la rajtojn de la konservativuloj el inter la membroj de la muzulmankultura anaro, kiu vivas inter ni. Oni zorgas pli pri la hiĝab-aferon ol pri la neceso, ke iliaj infanoj povu lerni kaj ludi samnivele kun la niaj –.

Iom da movado en Lapurdo<sup>(4)</sup>, ankaŭ en Bilbo<sup>(5)</sup>, Donostio<sup>(6)</sup>, Irunjo<sup>(7)</sup>... temas pri grupoj etaj kaj modestaj, sed ili efektivas pli kaj pli da iniciatoj favore al Kurdio. Oni ne povas forgesi, ke antaŭ kvin jaroj, dum okazis la jazida genocido, centoj da eŭskoj, de vilaĝo al vilaĝo, protestis, ĉar Izraelo estis bombadanta Gazaon. Afero sendube denuncienda, sed kiom ĉagreniga estis vidi tiom da multhomaj protestoj kaj rimarki, ke neniu atentis la detruon de Ŝengalo.

Kiam tio estis okazanta, en Roĵavo jam de du jaroj estis aŭtonoma sperto. La armeo de al-Assad koncentriĝis en la urboj kaj en la landoriento, kaj je tiu potencvakuo la kurdaj milicoj ekrespondicis pri la defendo kaj memregado de la popolo. La modelo de memregado estas malfacile kredebla, leciono pri harmonia kunvivado de kredoj, lingvoj kaj popoloj, kaj plej superba ekzerco de inpotencigo en Mezoriento.

La situacio neniam estis facila, kaj nun ankaŭ ne. La ŝengalajn vilaĝojn liberigis la kurdaj partizanoj antaŭ tri jaroj, sed malmultas la jazidoj, kiuj revenis tien. Interalie ĉar oni nenion faris por rekonstrui la vilaĝojn: la registaroj de la RKR<sup>(8)</sup> ĉiam regis tie nefideme, ties peŝmergoj forfuĝis en 2014, kiam la ĝihadistoj alvenis, kaj estis danke al la partizanoj, trejnitaj de la PLK<sup>(9)</sup> kaj batalintaj en Roĵavo kaj Sirio, ke oni liberigis la montojn, en kiuj restis la soifmortantoj. La klano Barzani konsideris la roĵavan sperton kiel minacon, ĉar multaj sudaj kurdoj naŭziĝas pro ĝia korupto. En la atako post la referendumo de 2017 Heŭlero<sup>(10)</sup> perdis la kontrolon de la regiono, sed Bagdado faris preskaŭ nenion por rekonstrui.

Ankoraŭ ĉiusemajne alvenas sciigoj pri infanoj aŭ inoj, kiuj fuĝis el la ĝihadistoj.

Germanio estas, kiu plej faris helpe al tiuj seks-sklavinoj. Krom doni vizojn ĝi prilaboris programon por trakti tiun hororan traŭmon.

Inter ni ankaŭ ege kreskis la intereso rilate la kurdojn. Aperis artikoloj, libroj, solidarecgrupoj kaj projektoj. Durango<sup>(11)</sup> interfratiĝis kun Kobano. *Garabide*<sup>(12)</sup> kunlaboras pri la lingvo kun la kurdoj. Malkiel kun tiuj, kiuj parolas arabe aŭ hispane, kun la kurdoj tuj aperas la komplikeco de la minoritatlingva parolanto.

Kvin jarojn post la jazida genocido la Islama Ŝtato ne posedas teritorion, sed, paradokse, kiam la sunaisma kaj la ŝijaisma islamismoj unuiĝas, ĉikaze Ankarro kaj Teherano, estas por bombataki la kurdojn. En la Kendil-montaro<sup>(13)</sup>, en la rifuĝintareo de Meĥmuro<sup>(14)</sup>, en Afrino aŭ ĉe la landlimo de Roĵavo, la minaco de Turkio ĉiam pretas por bati kie eblas. Kaj ankaŭ tie necesas la eŭska solidareco.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Çidayen Şengalê.
- (2) Mûsil.
- (3) La aŭtoro parolas pri Eŭskio.
- (4) Lapurdi, en la eŭska. Provinco de norda Eŭskio.
- (5) Bilbo, en la eŭska. Ĉefurbo de Biskajo, sudeŭskia provinco.
- (6) Donostia, en la eŭska. Ĉefurbo de Gipusko, sudeŭska provinco.
- (7) Iruñea, en la eŭska. Ĉefurbo de Nafaro, sudeŭska provinco.
- (8) Regiona Kurda Registaro (RKR)/Hikumetî Herêmî Kurdistan (HHK/KRG). Temas pri la registaro de aŭtonoma kurda teritorio en Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (9) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (10) Hewlêr.
- (11) Durango, en la eŭska. Urbeto en Biskajo.
- (12) *Garabide* estas eŭska asocio, kiu starigas projektojn por helpi al disvolviĝo de minorigitaj lingvoj.
- (13) Çidayen Qendîlê.
- (14) Mexmûr.

#### KLARIGOJ:

Aŭtoro: Urtzi Urritikoetxea.

(\*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 4-an de Aŭgusto 2019-a.

Tradukis: NXC. Aŭgusto 2019-a. Provlegis: DS.

